

Gazeto Andalusia


ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO



N-ro 21-22 ● 6-a Jarkolekto ● NOVEMBRO '88
FEBRUARO '89



Andalusia Esperanto-Unuiĝo



ESPERANTO
Internacia Lingvo

LA ESPERANTISTA STANDARDO ONDUMIS EN

JEREZO

OKAZE DE LA

6-A ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

FUNDADOR: JOSE GARZON RUIZ. SAN FERNANDO (CADIZ) 1910

EDITA: ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO. REDACCION: C/ SOL 75 41003 SEVILLA
DIRECCION POSTAL: Apartado 12.209. 41080 SEVILLA. TELEFONO: 954-41-58-64
DEPOSITO LEGAL: MA-1.136/86 IMPRIME: COPYUR, Cuesta del Rosario SEVILLA.
DIRECTOR: José María RODRIGUEZ HERNANDEZ REDACTORES: Francisco José NIEVES
PAVON, Pedro José GOSALVEZ OLMO.

DIRECCIONES DE INTERES

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Espeanto-Unuiĝo
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado 12.209 41080 SEVILLA

Grupo de Esperanto de MALAGA
Apartado de Correos 3275
29080 MALAGA

Asociación Sevillana de Esperanto
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación Cordobesa de Esperanto
Apartado 611 14080 CORDOBA

Grupo Esperantista de JEREZ
Apartado 320 JEREZ (Cádiz)

Grupo Esperantista de TORROX
Apartado 13 TORROX (Málaga)

Grupo de Esperanto de GRANADA
Facultad de Ciencias
GRANADA

Asociación Sevillana de Jóvenes
Esperantistas
C/ Virgen de la Antigua 4, bajo
41012 SEVILLA

Sección Andaluza de Jóvenes
Esperantistas
Apartado 611 14080 CORDOBA


Curso de Esperanto por Correspondencia
Apartado de Correos 864
29080 MALAGA

Grupo Baha'i de Amistad Esperantista
Apartado de Correos 280
LA LINEA DE LA CONCEPCION (Cádiz)

D.L. MA-1.136/86

ENHAVO

	PAGINA
★	
★	
★	
★	
★	CEFARTIKOLO 1
★	TRO PRETENDAJ 2
★	6a ANDALUZIA KONGRES ... 3
★	LA UNUA ESPERANTO-GRUPO . 7
★	INFORMOJ 8
★	POEZIO 9
★	E-AGADO OKAZE DE LA
★	EKSPOZICIO DE 1929 10
★	E-MC2 * SCIENCA PAGO 13
★	LA INSULO ALBORAN 14
★	NUN NI * JUNULARA PAGO .. 15
★	KRUCVORTENIGNO 16
★	
★	
★	
★	
★	
★	
★	
★	
★	
★	



esperanto,
internacia lingvo

CEFARTIKOLO

◊◊◊◊◊◊◊◊◊◊◊◊◊◊◊◊

Unue Saluton por ĉiuj esperantistoj de Andaluzio. Mi estas la nova prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo post la Generala Kunveno okazinta en Jerezo en decembro de 1988.

Mi pensas ke mi ne estas la kandidato pli lerta eĉ ne la plej taŭga, sed la manko de aliaj konkurantoj decidigis min akcepti la prezidantecon. Mi ne volas diri ke la balotado estas sinofero por mi. Ĉiuj kiuj konas min bone scias, ke labori por ia ajn asocio kiu nomas sin andaluzia estas io preskaŭ necesa por mi kaj eĉ plie se la vorto Esperanto akompanas al tiu de Andaluzio. Sed sendube esti prezidanto de asocio kiu laboras ĉiutage antaŭen kaj kiu intencas instruadi Esperanton en la tuta Andaluzio, estas laboro por persono kun multe da libertempo kiun, se mi nun feliĉe havas, la venontan jaron nur Dio pridiros. Resume mi klopodos laboradi laŭ mia tuta eblo kaj kapablo.

Dum mia prezidanteco mi precipe entreprenos tri punktojn:

- * Rilatoj de AEU kun oficialaj organizoj.
- * Pligrandigo de Esperanto en Andaluzio.
- * Kolektadi konitaĵojn por verki historionde Esperanto andaluzie.

Ĉiuj miaj kamaradoj estas bone konataj en la movado, nome la kasis to Tomás CASPE, kiu starigis Esperanton en Seviljo, fondinto de la Sevilja Esperanta Akademio. La sekretario José María RODRIGUEZ (karesnomita Ĉema) pri kiu mi ankaŭ ne povas ne laŭdi pro lia movademio (nuntempe li loĝas en Seviljo transloĝinte de Kordovo), fine menciis honore al la Vicprezidanto Alberto FRANCO, kiu laboras kune kun mi de kiam ni fondis SEJO-n (la Sevilja Junulara Organizo) jam pli ol kvar jarojn.

Kvankam kompreneble mi estas feliĉa pro ekprezidi AEU-n, krome ankaŭ mi malfeliĉas ĉar mi devis eksprezidantiĝi en SEJO. Kiel ajn estu mi gaja kaj esperoplena eklabori por Esperanto en Andaluzio.

Juan de Dios MONTOTO
Prezidanto de A.E.U.

TRO PRETENDAJ

Jesja, tutcerte ni estas tro pretendaj; ĉar pretendema estas la revo intenci eldoni esperantistan revuon kiu volas esti leginda ene de movado kiel la esperanta, tro ema produkti publikaĵojn sed ne tro legkapabla. Kaj kion ni volas nun, kiam ni komencas redakti revuon kun propra historio? Tre facile, atingi ke GAZETO ANDALUZIA estos leginda kaj se eble eĉ legenda revuo en la hispana movado.

Sciante ke nia revuo bonfartas kiam la movado en Andaluzio kreskas, kaj mezkvalitas kiam ni nur emas stagni. Do labori por AEU kaj por la revuo estas samtempa afero. Ni ŝategus redakti belaspektan revuon, kun ĝenerala intereso; por tio ni prizorgos multe la presan kvaliton, la kovrilojn kaj pruvos aperigi kiel eble malplej erarojn, por tio lasta ekde la proksima numero ni eĉ havos propran korektiston.

Pri la akurateco, tion ni ege promesas, komence de la surkovrila monato vi havos ĉe vi la revuon, kaj por ne komenci mispaŝe ni eldonis ĉi numeron dirante ke ĝi korespondas al la monatoj Novembro-Februaro, komprenu ke eldoni ankaŭ la Jerezan Kongreslibron estis labora tasko.

Pri la enhavo, krom la kutimaj paĝoj kiujn ni ĉiam aperigos, junulara, scienca, krucvortenigma, informa, ktp, ni enmetos kelkfoje intervjuaĵojn, rakontojn, komiksojn kaj eĉ kunlaborojn de altnivelaj gesamideanoj.

Kaj ĉi ĉio por kio utilos? Eble, por komprenigi ke Esperanto en Hispanio ne nur ekzistas norde; por vidigi al la esperantistaro ke AEU emas kaj kapablas labori altnivele; kaj por ke ĉiuj andaluziaj gesamideanoj sentos fierecon kiam ili montros al siaj apudaj najbaruloj revuon en tiu stranga lingvo kiu utilas por nenio.

Kaj se ni atingas tion, eble, ni povos orgojle prezenti nian laboron al la andaluziaj oficialaj instancoj kaj peti, eble tro pretendeme, ke ili pagos al ni la eldonadon de nia revuo. Tamen ĝis tiu momento ni esperas akompani vin kvarfoje jare por informi al vi pri multaj aferoj sed ĉiam en esperanto, la internacia lingvo. Krom tio ni, kompreneble, esperas ricevi vian helpon, ne nur per artikoloj, ĉiam bonvenaj aŭ ia ajn helpo, sed ankaŭ per viaj konsiloj, kritikoj kaj plendoj. Por tio simple kontaktu kun ni.


Tamen, relegante ĉi ĉion supra, ĉu ni ne estos tro pretendaj ...?

La Redakcio.

6a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO
JEREZO * DECEMBRO '88

Ĉiujare kiam finiĝas la kutima renkontiĝo de la andaluzia esperantistaro estas necese aperigi almenaŭ en la paĝoj de nia revuo resumon kaj komentojn pri tio kio okazis, ĉu por informi al tiuj kiuj ne sukcesis ĉeesti ĉu por ne forgesigi tiun kongreson dum la estontaj jaroj.

Multe oni diskutis antaŭe kaj eĉ dum la kongreso mem pri la senco de ĉi andaluziaj kongresoj, kie renkontiĝas ne nur gesamideanoj pretaj antaŭenirigi la internacian lingvon sed ankaŭ aliaj emaj turistoj, sed atentu jen ne kritiko aŭ plendo, ĉar mi pensas ke se la turismo disvolviĝas ene de esperantista etoso ankaŭ ĉi tio povas esti profitoplena por la movado, tamen estas necese diri ke ne ĉiuj, kaj eĉ ke ne multaj, kutime pleniĝas la salonojn dum la diskutoj aŭ dum la kulturaj agadoj, kaj ĉi ĉio ne ŝuldiĝas al la fakto ke ne multaj personoj ĉeestas la kongresojn ĉar plezure ĉiujare venas pliaj personoj, ĉi-jare 50.



Grupeto da gesamideanoj antaŭ
la esperanto-standardo.

Oficiale la Kongreso devus komenci vendrede vespere, la 2-an de Decembro, tiam ekatingis Jerezon kelkaj personoj, tamen la Kongreso efektive komencis sabate matene. La kunvenejo estis tre akceptema, bedaŭrinde pro lasthoraj problemoj la loko destinota al la Libroservo estis plena de grandaj kaj pezaj skatoloj, kaj pro tio ni devis organizi la libro-vendadon kaj ekspozicion en ne tro granda angulo, tamen poste ĝi rezultis tre taŭga loko ĉar ĝi lokiĝis ĝuste en la enirejo de la kunvenejo. La kunvenejo estis mezgranda salono, tre bele ornamita per E-drapiraĵoj.

Sabate matene, la 3-an de Decembro, okazis la aperto de la Kongreso, ĉi-jare okazis nek kantado de la himnoj nek salutado de la reprezentantoj, pri tio unua mi ĝojas ĉar ni neniam kantis tre bone sed pri tio lasta mi plendas ĉar ĉiam tiu akto estas bona ŝanco por ekvidi kaj ekkoni kelkajn gesamideanojn. Dum la ĉijara aperto la AEU-estraro kaj la partoprenantoj decidis kiel disvolviĝus la kongreso kaj baldaŭ oni ekparolis pri kelkaj AEU-aferoj. Tamen tuj venis la manĝ-horo, do ni ĉiuj devis marŝi al alia loko por serĉi manĝejon.

Dum la vespero oni parolis pri la ĉeftemo de la kongreso "Esperanto kaj la Eduka Reformo", ĉefe tiuj kiuj profesie instruas parolis pri kiel enirigi E-on en la lernejoj, tamen la konkludo ne estas tro kontentiga, ĉar oni vidis ke E-o nur ekzistos en tiuj lernejoj kie agadas profesoro kiu parolas Esperanton kaj nur dum tiuj horoj kiuj oni dediĉas al ne tro seriozaj aferoj.


Tiu sama vespero komencis la konferencoj organizataj dum la kongreso, ĉi serio nomiĝas "NUN TEMAS PRI..." kaj dum ĝi iu samideano parolas pri kelka temo kaj okazas poste debato; tiu vespero nia samideano Rikardo F. Albert parolis pri esperantista literaturo.

Dum la nokto de tiu unua tago okazis unu el la plej belaj kulturaj agadoj de la Kongreso, se mi estas sincera mi avertos ke mi unue malkonfidis pri tiu programero, LKK-ano anoncis ke ni, la kongresanoj povus ĉeesti prezenton de dancado en alia loko de la urbo, malĝuste mi ekpensis en infanetoj vestitaj en jupetoj dancante sur siaj piedfingroj ion simila al iu klasika simfonio -eble mi ne estas tre kulturema- kaj pro tio mi unue planis ne ĉeesti tiun programeron kaj enlitiĝi frue. Tamen iu konvikis min ne fari tion kaj vidi tiun dancadon; kaj kia belaĵo! Unue, mi eraris ĉar ne temis pri tia dancado kiun mi imagis sed male pri hispana dancado, kaj ja tuthispana, gojeska, kastilia, aragona, andaluza, ktp. Mi ne memoras kiom da tempo daŭris eble du horoj, tute estis tre, tre bela kultura programero, kaj tio eĉ malgraŭ la decembrnokta malvarmo.

Dimanĉe matene daŭriĝis la serio "NUN TEMAS PRI..." Ĉi-foje Alberto Franco parolis al ni pri la origino de la diversaj alfabetoj. Poste okazis teatro organizata de la grupo de teatro Caballeros de la Hispanidad de Malago, ĉi teatro okazis en la hispana lingvo, ĉar bedaŭrinde ne estis tempo por prepari ĝin esperantlingve; sendube estis tre simpatia akto, kaj malgraŭ la amatoreco de la aktoroj ili estis tre altnivelaj.


Post manĝado kaj kaftrinkado en la urbo ni denove iris al la restadejo, la restadejo "JEREZ" estas se ni komparas kun aliaj de la resto eĉ luksa. La ĉambroj estis 4-litaj kaj komfortaj, la banĉambroj estis tre purigitaj, bedaŭrinde ni ne povis uzi la manĝ-servon de la restadejo, kaj pro tio ni ĉiutage devis iri al la centro de la urbo por trovi taŭgan lokon por manĝi. Pri la nokta ferm-horo ne estis problemo, ni povis eniri eĉ je la 5-a matene, kaj kompreneble multaj profitis ĉi eblecon.

Dum la vespero de la dimanĉo ni ĉeestis alian konferencon, ĉi-foje far nia madrida samideano Jorge Camacho, kiu parolis pri la esperanta romanaro, sendube estis tre bona ideo subvencii al tiuj samideanoj kiuj estis pretaj prelegi pri iu temo, ĉar tio ebligis la ĉeeston de altkvalitaj samideanoj. Ankaŭ okazis prelego en la hispana lingvo, tiel nia sevilja samideano Juan de Dios Montoto parolis pri la temo Blas Infante y el Esperanto, kompreneble oni profitis tiun tagon, la 4-an de Decembro siatempa andaluza tago, por organizi ĉi konferencon.



Desegno de RAFAEL ALBERTI
speciale por ĉi Kongreso.

La London 5-an de Decembro okazis la ĝenerala asembleo de la Andaluza Esperanto-Unuiĝo, ĉi-jare la asembleo estis speciala ĉar oni devis elekti novan estraron kaj ankaŭ novajn respondeculojn por niaj servoj, revuo, monata informilo, koresponda kurso, ktp. Oni parolis pri multaj aferoj, unue pri ĉi tiu revuo mem, oni decidis daŭrigi la eldonadon de *GAZETO ANDALUZIA* laŭ la nuna formo kaj periodeco, ekde nun la nova respondeculo estas nia samideano José María Rodríguez Hernández kaj kiel redaktorojn oni nomumis al Francisco José Nieves kaj Pedro Gosálvez. Pri la monata informilo, ankaŭ oni decidis daŭrigi ĉi tiun servon, la respondeculo estos la toroksa samideano Antonio González Álvarez.



Unu el la konferencoj de la ĉi-jara prelegaro NUN TENAS PRI,

Unu el la plej gravaj-rezultoj de la Kongreso estis la decido seriozigi la korespondan kurson por faciligi la lernadon de Esperanto al ĉiuj andaluzoj en la tuta lando. Por tio oni nomumis kiel novajn respondeculojn al malagaj samideanoj Julio Herrero kaj Paqui Corrales, samtempe oni decidis pro pagandi kiel eble plej dise la kurson pere de ĵurnaloj, radioj, ktp. Oni konstatis ke se ni deziras ha-

vi esperantistan reton en Andalu--zio estos necese instrui E-on al personoj de ĉiuj provincoj kaj tio nur povos okazi se ni havas fruktodonan korespondan kurson kun multaj gelernantoj en ĉiuj andaluziaj provincoj.

Fine venis la momento elekti la novan estraron, post kelkaj konversacioj kaj elektoj oni decidis ke la nova estraro restos jene:

- * Prezidanto: Juan de Dios Montoto
- * Vicprezidanto: Alberto Franco
- * Sekretario: José M. Rodríguez
- * Kasisto: Tomás Caspe Cereijo

La tuta estraro loĝas en Seviljo, kaj pro tio ili devos kontakti kun la andaluza registaro por atingi pli facile helpon kaj subvenciojn.

Lunde vespere okazis projekcio de filmoj, oni vidis esperantlingve la polan filmon "ESPERANTO" kaj hispanlingve "EL GRAN DICTADOR", por fari tion ni uzis la video-aparaton de la restadejo. Ankaŭ oni projekciis lumbildojn de pasintaj andaluziaj esperanto-kunvenoj.

Nokte la junularo renkontiĝis en trinkejo por paroli pri la Andaluza Esperanto-Junularo, la prezidanto diris ke pro ĉiaspekaj aferoj oni ne multe laboris en ĉi asocio, malgraŭ oni faris ion, kiel faciligi la aĉetadon de libroj al la andaluziaj junaj esperantistoj pere de speciala oferto de AEJ. Oni decidis daŭrigi la laborojn kaj ankaŭ peti al la estraro de TEJO la organizado en Andaluzio de la Internacia Junulara Kongreso de la jaro 1993, en tiu jaro okazos ankaŭ en Hispanio -en Valencio pli detale- la Universala Kongreso.

La 6-an de Decembro estis la lasta tago de la Kongreso, aŭ pli bone diri duontago, ĉar oni planis programerojn nur ĝis la vespero.

Tiu mateno okazis la lasta konferenco de la serio NUN TEMAS PRI ĉi-foje samideano José María Rodríguez parolis pri la nuntempaj movadoj de aliaj internaciaj lingvoj. Poste okazis la lastaj diskutoj pri AEU, prefere pri tiuj temoj ne traktitaj la antaŭa tago. La Kongreso finis, kiel kutime per oficiala komuna bankedo. Tio okazis en la vespero de tiu tago, kaj kvankam multaj gesamideanoj revenis al siaj urboj en la mateno de tiu tago, prefere tiuj kiuj loĝis pli fore, ankoraŭ restis en Jerezo nombra grupo de afablaj geamikoj kiuj profitis la manĝadon por paroli kaj intertrakti plie.

greso okazis kelkaj anekdotoj, sed la plej kurioza afero estis ke pro akcidento en la telefon-servo de Jerezo la Hispana Telefona Kompanio instalas surstrate publikajn telefon-lokojn tute senpagaj, ja estis tre malfacile paroli en tiuj lokoj, tamen se oni atingis paroli kun la dezirata persono vivis tute trankvile paroli dum multe da tempo, kelkfoje eĉ dum horoj.


Nu la Kongreso jam finiĝis kaj ankaŭ la resumo kiun oni pruvis fari en ĉi tiuj paĝoj, la venonta kaj eble la venontaj kongresoj okazos en la malaga urbo Torrox, kie ni jam renkontiĝis en 1987.

Ni esperas vidi ĉiujn denove tiam en la monato Oktobro en la 7-a Andaluza Kongreso de Esperanto.



Tiam finiĝis la 6-a Andaluza Kongreso de Esperanto, ĉiuj restis dankemaj al la jerezaj gesamideanoj pro la organizado de la kongreso, kaj ankaŭ preskaŭ ĉiuj restis tute ĝojigitaj pro la telefona servo de ĉi urbo, kiu dum la tagoj de la kongreso estis tute senpagaj. Jes! Dum ĉi tiu kon-

Antaŭa kaj Nova Estraro de A.E.U.



Antaŭ unu jaro oni solenis feste en la tuta mondo la centjariĝo de la internacia lingvo Esperanto. En 1988 ankaŭ oni festis, iom pli modeste kvankam same solene la centjariĝon de la unua esperantista klubo en la mondo, tiu de la germana urbo Nürnberg. Estas kurioze konstati ke nur unu jaro post la naskiĝo de nia idiomo grupeto da homoj kuraĝis fondi klubon por la disvastigo de io kio en tiu tempo aspektis nur revema afero.

En 1885 oni fondis en tiu germana urbo la *Nürnberg Mondlingva Unuiĝo*, asocio por la disvastigo de Volapük, la tiama internacia lingvo kiu jam estis sufiĉe bone akceptata en kulturaj kaj komercaj rondoj. Leopold Einstein estis la vera pioniro de la grupo, li interesiĝis pri la mondlingva problemo kaj tial li lernis la malfacilan lingvon Volapük, verdire li eĉ estis unu el la malmultaj volapukistoj kiuj sufiĉe bone regis la lingvon. Tamen malgraŭ sia laboro por Volapük li diris en 1886: *Se iam aperos io pli bona ol Volapük, mi proklamos ĝin kiel la unua, ĉar la pli bona ĉiam estas la malamiko de la bona, kaj la plej bona la malamiko de la pli bona.*

Nur unu jaro post ĉi eldiraĵo, en 1887, pola okulkuracisto L.L. Zamenhof, sub la pseŭdonimo *D-ro Esperanto*, publikigis broŝureton sub la titolo *Lingvo Internacia*. Einstein rapide akiris sufiĉe bonan sciadon de la lingvo kaj post studado de la nova mondlingvo li skribis al Zamenhof en Varsovio: *La problemo de la internacia lingvo, estas definitive solvita, kaj ĝojigite mi sendas al vi korajn gratulojn al tiu ĉi solvo. Kion mi longe atendis, tio nun fine estiĝis.*

Ok semajnojn poste Einstein eldonis broŝuron titolitan *La Lingvo Internacia - la plej bona solvo de la internacia mondlingva problemo* - kiu ja estis bona argumento por Esperanto en Germanio. La publikigo de ĉi verketo kaŭzis grandan konfuzon inter la volapukistoj pro la fakto ke Einstein estis ja unu el la plej altnivelaj regantoj de tiu lingvo, kaj pro tio li ricevis grandajn kritikojn eĉ de Schleyer mem, kreanto de Volapük kaj intima amiko de Einstein.

Malgraŭ la kritikoj kaj atakoj Einstein decidis eldoni duan broŝuron, ĉi-foje pri la evoluo de la mondlingvoj. Okazis tiam, la 1an de Septembro de 1888, ke la *Nürnberg Mondlingva Unuiĝo*, ĝis tiu momento asocio kiu disvastigis Volapük, decidis alpreni oficiale Esperanton kaj iĝi *Esperantista Klubo Nürnberg*; tiel naskiĝis la unua Esperanto-klubo en la mondo. Tiu asocio same iniciatis la aperon de la unua esperanto-revuo *La Esperantisto* en 1889, redaktita komence de la prezidanto de la klubo Christian Schmidt kaj poste eĉ de Zamenhof mem.

Tiu estis la komenco de la Esperanto-Movado, kiam nia lingvo ne estis nur gramatikaĵo kaj iĝis ankaŭ movado kiu interrilatigis homojn en la tuta mondo. Cent jarojn poste, fine de oktobro de 1988, la nuntempa Esperanto-Grupo de Nürnberg organizis kelkajn agadojn por inde memori ĉi jubileon, tie estis UEA-estraranoj, akademianoj kaj gravaj roluloj de la Esperanto-movado, kiuj renkontiĝis kaj disertaciis pri la komenco de Esperanto en la mondo.

Redaktita laŭ broŝuro ricevita de la Nürnberg Esperanto-Grupo.

INFORMOJ

SEVILJO

La pasintan 28-an de Januaro oni inaŭguris la novan sidejon de SEJO -la junulara sevila organizo-. La sidejo troviĝas en centra kvartalo de la urbo, kvankam malproksima de la kutima E-sidejo.

MALAGO

Entute 41 personoj ĉeestis la novan kurson de la internacia lingvo en Malago, organizata de la loka grupo kaj de RENFE. Kvankam ĉi kurso estas ĉefe por fervojistoj, ĝi estas malfermita por la publiko.

KADIZO

Malfeliĉe ni informas pri la forpaso de nia kadiza amiko LUIS MELERO, disvastiganto de E-o en Kadizo

kaj Rota. Nia samideano mortis kelkaj tagoj antaŭ ol la Jereza Kongreso.

KORDOVO

Finigis la kurso de E-o organizata de la Kordova Urbodomo ĉe la Casa de la Juventud, sub la gvidado de la loka grupo. Samtempe oni organizis ekspozicion kaj aperis nova numero de la revuo LA KORDOVA ESPERANTISTO.

GRANADO

AEU ĵus sendis leteron al la Muzeo F. GARCIA LORCA en Fuentevaqueros (Gr) por donaci la ĝis nun tradukitajn verkaĵojn de ĉi andaluzia poeto. Ni esperas same prelegi tie pri Esperanto.

----- Multajn aliajn informojn vi trovos en la monata informilo MONATE DE VI -----

La Historia Arĥivo de la AEU ĵus eldonis kelkajn kopiojn de unu el la plej famaj E-afiŝoj en Hispanio.

Temas pri afiŝo eldonita de la Generalitat de Catalunya okaze de la hispana intercivitana milito.

NUN VI POVAS ATINGI TUTKOLORAN KOPION DE LA AFIŜO.

Formato A3 → 350 Ptoj

Formato A4 → 250 Ptoj

(inkluzive sendokostoj)

Adresu rekte al:

* Historia Arĥivo de AEU
Apartado 611. 14080 CORDOBA



ANDALUZIA POEZIO

=====

Iu demandis min pri mia aĝo,
vidante blankharojn en mia kapo kaj vungoj.

Mi respondis: "Se mi diras ĝuste mi vivis
nur dum unu momento".

"Ĉu vere? -Li diris.- Klarigu tion.
Vi rakontis al mi tre strangan novajon."

Mi lin respondis: "Tiun kiu posedas mian koron
mi kisis, unufoje, surprize.

Dum mia tuta vivo, mi pensos
ke mi certe vivis nur dum tiu momento."

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

Oni diras min: "Li estas for". Mi respondas: "Sufiĉas
se li estas kun mi ene de sama Tempo el kiu li ne povas eliri.

La sama suno kiu pasas super mi, pasas ankaŭ super li
ĉiutage, kiam ĝi renovigas sian lumon.

Do, tiu, kiu distancas de mi
nur unu tago, ĉu estas fore de mi?

Krome, en la saĝeco de la Kreanta Dio ni estas kunaj.
Ĉi kuneco sufiĉas por mi. Mi ne bezonas pli."

ABU MUHAMMAD ALI IBN HAZN AL-ANDALUSI

Pli konata kiel IBN HAZN naskigis en Kordovo en la jaro 944-a.
Li estis filozofo, jugisto kaj ĉefe poeto, versajne la plej alt-
kvalizta poeto de Kordovo. Sia plej grava verko estas TAUG AL-
HAMANA (La Kolringo de la Kolombo), por la sciencistoj ĝi estas
la plej impona verkaĵo de la arab-andaluzia literaturo.

ESPERANTISTA AGADO OKAZE DE LA IBEROAMERIKA EKSPOZICIO * SEVILJO 1929

En 1992 okazos en Seviljo la Universala Ekspozicio. Dum ĉi tiu evento la E-Movado intencas se ne organizi gravegajn kaj imponajn okazintaĵojn, ja almenaŭ reliefigi la neceson ordigi la internaciajn rilatojn pere de neŭtrala kaj internacia lingvo: Esperanto.

Ankaŭ, antaŭ duonjarcento, en 1929, okazis en Seviljo internacia ekspozicio, ne universala kiel tiu de 1992, sed iberoamerika, kiu restigis gravajn postsignojn en la sevilja vivo.

Hodiaŭ granda parto de ĉi andaluzia urbo disvolviĝis laŭ la urbanismaj planoj redaktitaj okaze de tiu ekspozicio. Ankaŭ dum tiuj jaroj oni konstruis en Seviljo dekoj da belaj pavilonoj fare de la partoprenantaj landoj kaj de la nacia organiza komitato. Sendube la plej grava rezulto de la Ekspozicio estis la arkitektura enriĉigo de la urbo; nuntempe post kvindek jaroj ankoraŭ ekzistas tiuj majestaj pavilonoj, kiuj montras la belecon de ĉiu lando, kaj ĉi tiel ne estas strange vidi meksikan templon, peruan palacon, baskan kampardonon, portugalan domon aŭ argentinan tipan konstruaĵon apud la rivero Gvadalkiviro, kaj ankaŭ la modernistajn kaj mudeharajn pavilonojn ĉe la Placo Ameriko, la Placo Hispanio aŭ la la Parko Maria Luisa.

Tamen la kerno de ĉi tiu artikolo ne estas la arkitekturo kaj la urbanismo okaze de la Iberoamerika Ekspozicio sed ja la esperantista agado dum ĉi tiu evento.

La unuaj kontaktoj inter la Sevilja Esperanto-Grupo kaj la Organiza Komitato de la Ekspozicio okazis en 1925. En tiu jaro oni organizis en la apuda urbo Kordo-

vo la 3-an Iberian Esperantistan Kongreson. Kelkajn monatojn antaŭe S-ro Azorín, fama kordova esperantisto, kontaktis kun la Sevilja Grupo por organizi viziton al la urbo Seviljo dum tiu Kongreso. La Sevilja Grupo decidis tiam organizi komisionon kies anoj, S-roj Ildefonso Montero, Manuel Iznardo kaj Carlos Martínez, devus ellabori programon por ĉi vizito. Ili plenumis sian laboron kaj projektis viziton al Belarta Muzeo, al la Katedralo, al la Preĝejo de la Caridad kaj al la Alkazaro. Same dum la vespero de la tago 13a de Majo, dato kiam oni ricevis la viziton, la geesperantistoj estus akceptataj de la Organiza Komitato de la Iberoamerika Ekspozicio, pli konkrete de S-roj Mañes Jerez, Castejón y Muñoz kaj Sanromán. Ĉi Organiza Komitato regalis la geesperantistojn per bankedo en unu el la pavilonoj de la Placo Ameriko.

Entute estis 35 gesamideanoj kiuj vojaĝis de Kordovo al Seviljo, inter ili estis belgo, ĉekoslovakio, germano kaj anglo. La Organiza Komitato organizis ankaŭ viziton al la jam konstruitaj pavilonoj kaj klarigis al la ĉeestantoj la celojn de la Ekspozicio.

Post ĉi unua kontakto la Sevilja E-Grupo ricevis la 7an de Novembro de 1926 leteron de S-ro Mojado, tiama prezidanto de la Hispana E-Asocio, dirante ke estus tre konvene organizi en la urbo Seviljo la venontan Hispanan Kongreson de Esperanto kiu koincidus kun la Iberoamerika Ekspozicio. Kelkajn semajnojn poste, S-ro Mojado denove sendis leteron klarigante ke jam alproksimiĝis la dato kiam oni devus preni akordon pri ĉi temo. La kunveno de la Sevilja E-Grupo respondis al la Hispana Asocio di-

rante ke en tiu momento la rimedoj kaj la fortoj de la Grupo estis malmultaj, kaj do oni devis rifuzi la proponon, ekscepte se oni ricevas ĉiuspecan helpon de la Hispana E-Asocio kaj de la Hispana E-Instituto; ĉi tio estas komprenebla se ni antaŭscias ke la monaj rimedoj de la Sevilja Grupo estis nur 500 ptoj.

Komence de la jaro 1927 S-ro Mojado, nome de la Hispana E-Asocio, certigas ĝian helpon kaj kunlaboron por la organizado de la Kongreso. Oni ellaboris la programon decidante ke unu el la tagoj de la Kongreso estus dediĉata al la iberoamerikaj gesamideanoj, kiuj venus al Seviljo okaze ankaŭ de la Ekspozicio. Oni aprobis samtempe ke la honora prezidanteco kaj vicprezidanteco estus proponataj al la Reĝo kaj al la Reĝa Delegito de la Ekspozicio.

Okaze de ĉi unuaj decidoj S-ro Mangada, membro de Hispana E-Asocio kaj aktiva esperantisto proponis la eldonadon de bulteno de la kongreso kiu estus samtempe propagandilo de la internacia lingvo kaj de la Ekspozicio ĉar oni uzus por la disvastigo de la bulteno la delegitan reton de UEA en la tuta mondo.

La 3-an de Julio de 1927 S-ro Carlos Martínez, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, renkontiĝis en Madrido kun S-ro Cortezo, en ĉi tiu kunveno oni decidis okazigi la Hispanan Kongreson de Esperanto dum la Iberoamerika Ekspozicio, ĉar tiu estis la deziro de multaj hispanaj geesperantistoj; do la kongreso okazus de la 3-a ĝis la 9-a de Novembro de 1928, krome la Hispana E-Asocio kontaktus kun la Turisma Oficejo de Seviljo por la eldonado de dokumentoj kaj propagandiloj en esperanto pri la internacia lingvo kaj Seviljo.

En Aŭgusto de 1927 la ĵurnalo ABC publikis artikolon pri la Ekspozicio kaj Esperanto; ĉi artikolo kritikis ade la utilecon de nia lingvo dubante pri la efektiva rolo kiun ĝi povus plenumi kiel komunikilo okaze de internaciaj kunvenoj kiel la Iberoamerika Ekspozicio. Ĉi artikolo aperis en speciala numero kiun ABC publikis okaze de la Ekspozicio, kaj siafoje oni aperigis ĝin en aliaj naciaj ĵurnaloj. La respondo estis tuja, S-ro Martínez respondis al ĉiuj ĵurnaloj kiuj publikigis tiun artikolon petante necesan klarigon.



La Plaza de España, unu el la plej imponaj konstruaĵoj de la Iberoamerika Ekspozicio, Seviljo 1929.

En 1928 okazis en Seviljo la Iberoamerika Ekspozicio kaj la Hispana Kongreso de Esperanto. La Kongreso estis bone akceptata en la ĵurnaloj kaj radioj, la fervojkompanio por faciligi la ĉeeston de nombra samideanaro, hispana kaj tuteŭropa, partopreni en la Kongreso kaj ĉeesti la Ekspozicion, ofertis specialan rabaton; samtempe oni eldonis gvidlibrojn informante pri hoteloj kaj restadejoj en Seviljo. Kelkaj gravuloj akceptis honorajn postenojn en la Estraro de la Kongreso. Reĝo Alfonso la 13-a estis la Honora Prezidanto kaj Honoraj Vicprezidantoj estis la Kaptano-Ĝeneralo, la Urbestro kaj la Reĝa Delegito ĉe la Iberoamerika Ekspozicio.

Ĉi Kongreso ankaŭ estis internacie disvastigata, eĉ HEROLDO DE ESPERANTO eldonis specialan numeron, Teo Jung ĉeestis kaj atingis unu el la premioj de la belartaj konkursoj, organizataj dum la Kongreso dank' al la subvencioj ricevitaj de Seviljaj Institutoj.

Tamen dum la okazigado de la Kongreso, organizata samtempe al la Iberoamerika Ekspozicio, oni forgesis iom la esperantistan partoprenon ĉi tiu Ekspozicio, verŝajne la ne-universaleco de tiu kunveno ne faris necesa la uzadon de internacia lingvo, pro la fakto ke la ĉeestantaj landoj parolis la hispanan.

Sed en la ĵurnaloj oni elstaris la Sevilja E-Kongreso kiel unu el la kunvenoj kie ĉeestis pli granda nombro da eksterlandanoj, verŝajne multaj samideanoj venis al Seviljo ne nur pro la alvoko de la interna ideo, sed ankaŭ pro la okazigado en Seviljo de la Iberoamerika Ekspozicio.

José María RODRIGUEZ HERNANDEZ
Historia Arĥivestro de A.E.U.

SAKLUD-PROBLEMO


Jen unu el la plej klaraj ekzemploj de la defend-sistemo Petrov.

La nigruloj ekmovas kaj matisgas post tri movoj.

SOLVO

=====

1.- ... - Cf6 x P e4
2.- Kg5 x D a8 - Kc5 x Pf2+
3.- Re1-e2 - Kc8-g4 mato



a b c d e f g h

8
7
6
5
4
3
2
1

LA INSULO ALBORAN'

Alboran estas malgranda andalu-
zia insuleto kiu troviĝas meze de
la mediteranea maro, pli malpli
je la sama distanco inter la his-
pana kaj la maroka marbordo. Ĝi
mezuras 576 x 239 mtoj, kaj entu-
te 5 kvadrataj kmoj. Administra-
cie ĝi apartenas al la almeria
provinco kaj kvankam ĉirkaŭ ĝi la
fiŝkaptado estas abunda, en ĝi es-
tas nek vegetaĵoj kaj eĉ ne akvo.

La intereso de la insulo, krom
la milita pro ĝia strategia loko,
devenas de la fakto ke ĝi estas
en la mezo de la distanco de la
submara komunik-kablo kiu ligas
al Meliljo kun la duoninsulo. Al-
boran estas kiel triangulo; ekde
1860 la solaj enloĝantoj de ĉi te-
ritorio estis la lumturisto kaj
sia familio, kaj eĉ ili forlasis
la insulon antaŭ kelkaj jaroj. Do
Alboran estis senhoma tero dum
multaj jaroj.


Tamen la hispana mararmeo de-
cidis sendi tien gruponda solda-
toj, pro la fakto ke, laŭ la ar-
meo, estis necese okupigi la in-
sulon por eviti ke aliaj armeoj
povos uzi la insuleton kiel "avia
dilsipon". Konkrete oni eltrovis
en Alboran restaĵojn de manĝaĵoj
produktitaj en Sovetunuiĝo; laŭ
la armeo la ne-okupiteco de la in-
sulo logis al la militaj ŝipoj de
iuj landoj viziti kaj inspekti la
insulon. La decido estis rapida,
por eviti la sovetaĵn kaj alilan-
dajn vizitojn estis necese sendi
grupeton da soldatoj, entute nun-
tempe estas 21 sub la ordonoj de
kapitano.

Tamen tiuj kiuj estas pli feli-
ĉaj pro la mararmea ĉeesto estas

hispanaj fiŝkaptistoj. Tiel se iu
el ili malsaniĝas, ili rapide
iras al la hospitaleteto de Alboran
kaj se la malsano estas grava la
helikoptero de la insulo transpor-
tas lin al Almerio. Same se kelka
grava futbalmatĉo estas televida-
ta, la kapitano de la insulo raj-
tigas al la fiŝkaptistoj iri al
Alboran kaj vidi kun ili la mat-
ĉon.

Sed tiuj kiuj ne estas tute
feliĉaj estas la soldatoj mem, en
tute ili estas tie dum periodoj
de 21 aŭ 45 tagoj. Tamen neniu
prizorgas ilin, ĉar certe Alboran
utilas por nenio kaj ili estas
tie por okupi malgrandan terspa-
con.

Do, se vi iufoje vidas mapon
de Andaluzio aŭ de la nordo de
Afriko serĉu tiun triangulan insu-
leton, kaj se vi iufoje aŭdas ion
pri la Maro de Alboran, sciu ke
la nomo devenas de insuleto kiu
troviĝas meze de tiu maro.



NUN NI



*** JUNULARA ALDONAJO AL GAZETO ANDALUZIA ***

Malgraŭ la ne-multaj agadoj de la Andalusia Esperanto-Junularo dum la jaro 1988, grupeto da gejunuloj renkontiĝis okaze de la Jereza Kongreso en trinkejo je malfrua horo por iomete paroli pri AEJ.

Kio okazis? Nu, unue la prezidanto pardonpetis pro la fakto ke AEJ restis dormema dum tiu jaro, tamen tio suldiĝis al kelkaj privataj aferoj de AEJ-estraranoj.

Male oni elstaris la sukceson de la oferto aĉeti librojn duonkos te por la andalusiaj gejunuloj. Ankaŭ oni rimarkis la malfacilaĵojn trovitaj ĉe la Dirección General de la Juventud de la Junta de Andalucía por agnoski la personecon de AEJ kiel junularan organizon. Tio eĉ igis necesa intervjuon inter ĉefa funkciulo de tiu regiona departemento kaj la prezidanto de AEJ. La rezulto estis seniluziiga, AEJ devos ŝanĝi multaspekte sian statuton, kaj ŝanĝigi tiun de AEU, por aljustigi al la nuntempa situacio de la andalusiaj junularaj organizoj. Tiuj ŝanĝoj jam efektiviĝis dum la Jereza Kongreso kaj verŝajne antaŭ ol Somero AEJ estos agnoskita de la Junta de Andalucía; memoru ke agnosko signifas kunlaboron kaj subvenciojn.

La lasta traktita temo de tiu renkontiĝeto estis la ebla organizado de IJK (Internacia Junulara Kongreso) en Andaluzio. Tre reveme la prezidanto proponis sendi leteron al la Estraro de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kaj kandidatigi nian regionon kiel sidejon de la IJK de la jaro 1993.

En tiu jaro okazos en Valencio la Universala Kongreso, kaj kiel kutime TEJO devos okazigi sian kongreson en la sama aŭ apudlando. Do, Andaluzio estas taŭga loko. Pri la rimedoj por organizi tiun kongreson ni eble disponus de la nuntempa andalusia junularo kiu jam organizis kelkajn kongresojn je nacia kaj regiona nivelo.

Same la averaĝa aĝo de tiuj gejunuloj en 1992 kaj '93 estos 25-30 jaroj, do oni povus trovi iom da tempo libera por labori en la organizado. Pri la loko la urbo plej taŭga estos Seviljo aŭ Malago, tamen nuntempe neniu el ambaŭ enhavas sufiĉan reton de junularaj restadejoj por gastigi almenaŭ 700 gejunulojn.


Sed estas necese diri ke malgraŭ ĉi projekto kandidatigi nian landon kiel IJK-sidejon, ĝis nun oni ne sendis la peton al la TEJO Estraro. Kial? Persone mi, kiel prezidanto de AEJ, atendas du faktojn; unue: la apogon de aliaj personoj, eble ni la andalusiaj gejunuloj jam havas tro multajn respondecojn ĉe E-instancoj; kaj due: la apogon de nia regiona administracio, por pruvi atingi tion estos necese antaŭe oficialigi AEJ-n.

Tamen, oni devas kompreni ke 1993 estos taŭga jaro por organizi internacian kongreson en Andaluzio, kaj ke per tio sendube multe disvastiĝos E-o en nia lando. Sed se tio fine eĉ ne pripensas, estus tre konvene organizi kutiman internacian seminarion por gejunuloj, memoru la sukcesajn germanajn IS-ojn.

GIGANTA KRUCVORTENIGMO

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13

1
2
3
4
5
6
7
8
9
10
11
12
13
14
15
16
17
18
19
20



HORIZONTALE. -

1. Hispana Regiono, Trinkajo.
2. Persona pronomo, Japana vestaĵo, Sufikso signifanta unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo.
3. Du konsonantoj, Vokalo kaj konsonanto, (Plurale) Konscie emo al io.
4. Sciigo al la publiko presita sur papero kaj gluita sur muro, Verba finaĵo, Literoj de NEONA.
5. (Inverse) Verba finaĵo, (Sen la lasta vokalo) Senorda konfuzo, Konsonanto.
6. Vegetaĵo bulba uzata kiel spicaĵo, Argileca mineralo, Trifoje la sama vokalo.
7. Literoj de ULMO, Vokalo, Vegetaĵo formita de kunigo de fungo kun algo.
8. (Pl) Rilata al vesto kiun portas la virinoj, Literoj de RETO, Vokalo.
9. (Inv) Homaspekta aŭtomato kiu obeas ordonojn, Speciala bruo pro bato kontraŭ io plata.
10. Sufikso kiu montras lokon, Prefikso, Adjektiva finaĵo, (Inv) Poseda pronomo.
11. Du konsonantoj, Verba finaĵo, (Infinitivo) Kalkeca substanco el kiu konsistas la skeleto de vertebruloj, Ne-uzata persona pronomo.
12. (Inv) Ne-difinita loko, Rilata al nobla nomumo, Nervoza ekmovo.
13. (Inv kaj akuz) Muzika sono, Akuzativa finaĵo, Vokalo, Vokalo.
14. Konsonanto, Persono kiu publike parolas, Adjektiva finaĵo.
15. Adjektiva finaĵo, Du konsonantoj, Funkciulo de religia kulto.
16. (Inv) Post, (Inv) Demanda vorto uzata por koni la posedanto de io.
17. Malbela afrika besto, Konsonanto, Vokalo.
18. Vokalo, (Imperative kaj inverse) Anserbleki, Verda mineralo, Konsonanto.
19. Festo per kiu oni solenas la 100an, 50an aŭ 25an datrevenon de grava fakto, Eŭropa lando.

VERTIKALE. -

1. La plej alta reprezentanto de iu lando ĉe alia, (Pl) Mitologia estaĵo duonhoma kaj duonĉevala.
2. (Pl) Virina diaĵo de akvoj, arbaroj kaj montoj, Hazardludo, (Adjektive kaj inverse) Kelko, Verba finaĵo.
3. Konsonanto, Verba finaĵo, (Pl) Gradita rondo de cirklo ĉe astronomia, geodezia aŭ matematika instrumento, Akuzativa finaĵo, (Inv) Multkolora.
4. (Inv) Rilata al persa ludo, Sustantiva finaĵo, (Inv) Plus -BARD afrika arbo, Japana ludo, (Inv) Ĉe la ortodoksuloj sankta pentraĵo.
5. Movebla rando de la buŝo kiu kovras la dentojn, Lakto kazeigita per speciala fermento, (Inv) Fatigata.
6. Sufikso sen difinita senco, Aro da kantistoj, Sufikso signifanta ripeton, Adjektiva finaĵo, Konsonanto, (Adverbe) Interpreti skribaĵon.
7. (Adjektive) Ĉiela zono, (Inv) Prefikso signifanta abomenon, (Adjektive) Legomo kun dika mangebla radiko, Sustantiva finaĵo.
8. (Adverbe) Sufikso signifantan virinan sekson, (Inv kaj sustantive) Glati ion per frotado, (Pl) Afrika komunikilo.
9. (Inv) La tri komencaj literoj en vortoj kiuj esprimas studojn aŭ studentojn de la bestoj, (Inv) Verba finaĵo, (Inv) Rapide sin levi tutkorpe de tero per risorgita svingo de kruroj, (Inv) Verba finaĵo, (Inv) Prepozicio.
10. Kelko, (Inv) Kurblinio, (Inv) Vojo inter konstruaĵoj, Prepozicio.
11. Ferhava argilo kiun oni modlas aŭ muldas kaj poste bajas sen glazuro, (Inv) Adverbo, Verba finaĵo, (Akuz) Organo de aŭdkapablo.
12. (Akuz) Elemento de tutaĵo, (Inv) Malfeliĉa okazo, (Inv) Kelko, Verba finaĵo.
13. Sustantiva finaĵo, Prepozicio, Trifoje la sama litero, (Sustantive) Persona nedifinita pronomo, Adjektiva finaĵo, Trinkajo.

Horizontale 7. Konsonanto. Verba finaĵo. Literoj de RASTU.
Germana nomo.

1989

JANUARO

L	M	Mk	J	V	S	D
						1
2	3	4	5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	29
30	31					

FEBRUARO

L	M	Mk	J	V	S	D
			1	2	3	4
			5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	

MARTO

L	M	Mk	J	V	S	D
			1	2	3	4
			5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	29
30	31					

APRILIO

L	M	Mk	J	V	S	D
					1	2
3	4	5	6	7	8	9
10	11	12	13	14	15	16
17	18	19	20	21	22	23
24	25	26	27	28	29	30

MAJO

L	M	Mk	J	V	S	D
			1	2	3	4
			5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	29
30	31					

JUNIO

L	M	Mk	J	V	S	D
					1	2
			3	4	5	6
7	8	9	10	11	12	13
14	15	16	17	18	19	20
21	22	23	24	25	26	27
28	29	30				

JULIO

L	M	Mk	J	V	S	D
					1	2
3	4	5	6	7	8	9
10	11	12	13	14	15	16
17	18	19	20	21	22	23
24	25	26	27	28	29	30
31						

AUGUSTO

L	M	Mk	J	V	S	D
			1	2	3	4
			5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	29
30	31					

SEPTEMBRO

L	M	Mk	J	V	S	D
					1	2
			3	4	5	6
7	8	9	10	11	12	13
14	15	16	17	18	19	20
21	22	23	24	25	26	27
28	29	30				

OKTOBRO

L	M	Mk	J	V	S	D
						1
2	3	4	5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	29
30	31					

NOVEMBRO

L	M	Mk	J	V	S	D
			1	2	3	4
			5	6	7	8
9	10	11	12	13	14	15
16	17	18	19	20	21	22
23	24	25	26	27	28	29
30						

DECEMBRO

L	M	Mk	J	V	S	D
					1	2
			3	4	5	6
7	8	9	10	11	12	13
14	15	16	17	18	19	20
21	22	23	24	25	26	27
28	29	30	31			